FN PER ANC 47


# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

.unuiĝo de la normandaj esperantistoj

n° 169

TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE:

SEPTEMBRO 1990A - ( AUTUNO 1990A - N° 84A - NOVA SERIO )


*Minimuma Kotizo por 1990 : 45 frankoj. CCP 283 40 H ROUEN*
*Sendu vian postcekon rekte al via CCP Centro.*
*bankcekon al Pierre Quillaud*
*16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly*


*Redaktas : Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois*
*14 200 Hérouville St Clair. Tel. 31 95 11 81*


Hérouville Saint-Clair

# NIA ĜENERALA ASEMBLEO

*KARAJ GEAMIKOJ,*

*Por prepari tiun por nia asocio tre gravan kunvenon, la bulteno iom strange aspektas. Ĝi enhavas du planojn por helpi tiujn inter ni kiuj neniam vizitis la urbon.*

*La unua klarigas kiel aùtomobile atingi la tranoktejon kaj la kunvenejon. Tiuteme, bonvolu noti ke la ŝlosiloj de viaj dormĉambroj estos disdonataj* ***NUR JE LA 18a VESPERE,*** *konsekvence ne iru al Centre International de Séjour (C. I. S.) antaù tiu horo. Dankon.*

*La dua plano helpos vin kiam vi deziros piediri ĝis la kunvenejoj. Dek minutoj sufiĉos laù tute sendanĝera vojo... ĉar senaùtomobila !*

*" "C. I. S," "Centre Socio-culturel" kaj "salle polyvalente des Belles Portes, tri malsamaj lokoj por malsamaj eroj de la programo. Antaù ĉio, ĝin kontrolu plej atente...*

*Tre afable Georges* ***LAGRANGE*** *kaj* ***NIKOLIN'*** *favore respondis al nia invito. Nikolin' kantos nur en Esperanto, kiel ŝi jam faris plurfoje kaj ricevis grandan sukceson en internaciaj renkontoj. Jam pluraj kasedoj aperis, eĉ VHS-vidbendo pri "kvindek parizaj jaroj". Georges Lagrange, elstara tradukisto kaj verkisto en la esperantistaj medioj, jam regalis kaj regalos plu nin per siaj skecoj. Krome, en La Chauds de Fond (Svislando) kaj Bouresse li jam respondecis plurajn staĝojn pri tre diversaj temoj. Tiufoje temos pri du fame konataj aktivuloj kiuj grave kontribuis al sukceso de Esperanto inter la du mondmilitoj.*

*Nur kvar paga, tiu magra bulteno ankaù reliefigas la veran situacion de nia asocio. Ni serioze diskutu, kaj trovu solvojn dum la ĝenerela kunveno, ĉar tre probable de niaj decidoj dependos la estonteco de nia unuiĝo ! Viaj kontribuoj ĉiel bonvenas !!!*

***NI VIN ATENDAS !!!***

**BUS de**
**La Gare SNCF**

Lignes n° 6
7
15

DESCENDRE À :
- Cité
- Nouvel Horizon
- Bibliothèque


**C.I.S**


1, place de
L'EUROPE
Tel : 31954100

**CENTRE SOCIO-CULTUREL**

2.02 Bd
des Belles Portes
(Prendre la
rue n°2 )

← Caen






******************************************************************************

# LA PROGRAMO

## en la 20a kaj 21a de Oktobro

***SABATE SABATE SABATE SABATE SABATE SABATE SABATE SABATE SABATE***

*14H30 - 17H30 : la Ĝenerala Asembleo (en CENTRE SOCIO CULTUREL BELLESPORTES*
*"Nuna situacio kaj estonteco por nia Asocio"*

*18H00 : Disdono de la ŝlosiloj de la dormĉambroj (en C. I. S.)*

*19H00 : Vespermanĝo (en Centre International de Séjour -CIS-*

*20H30 : Distra parto (en SALLE POLYVALENTE DES BELLES PORTES)*
*"Nikolin' kaj Georges Lagrange"*

***DIMANĈE DIMANĈE DIMANĈE DIMANĈE DIMANĈE DIMANĈE DIMANĈE DIMANĈE***

*8H30 - 9H30 : Kunveno de la Estraro (en Centre Socio-Culturel)*

*10H00 - 12H00 : Prelego de Georges Lagrange (en Centre Socio-Culturel)*
*"Edmond PRIVAT kaj LANTI"*

*12H30 : Tagmanĝo (en C. I. S.)*

*14H15 : Vizito de la Muzeo por Paco (proksimume dum 2 horoj)*